Jaro III/VII. N-o 7 (31) Aprilo 1926

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
Fondita en 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO:

L. Bergiers: La aliaj. — *Av. Isanakjan:* Abu Lala Mahari. Trad. *G. Sevak.* — Prof. *A. V. Nemilov:* Biologia tragedio de l' virino. Trad. *Nikolao Ŝevĉugov.* — *Gertrud Räuber:* Novaj vojoj en juĝado de seksoj. — *A. Bezimenski:* Patrino. Trad. *N. V. Nekrasov.* — *Z. Libin:* Kiun el ili? Trad. *Trinaŭkvinok.* — Nokte. Trad. *W. Kampfrad.* — *Paul Neugebauer:* Pri patrintago. — La bonŝancaj infanoj de Derbyshire. Trad. *M. Starr.*

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Tiu ĉi n-o de "Senn. Revuo" estas ankaŭ dediĉita al la virina problemo, kiel la antaŭa. Nur kelkaj specialaj trajtoj iom pli kolorigis ĝian enhavon; ili estas la specifikaj elementoj de patrineco kaj sekso. La virino, kiel laborulo, kiel homo, kiel kamarado, kiel edzino kaj fine kiel patrino — ĉiuj ĉi diversaj vidpunktoj estas po iom tuŝitaj en diversaj aspektoj sur la paĝoj de l' ambaŭ kajeroj.

Atentema okulo kaj pripensema kapo certe sukcesos trovi inter tiu ĉi tuta materialo la necesajn konkludojn. Ni mem ne trudas ilin, ili devas mem trovi vojon en la cerbojn de ĉiuj proletarioj. Kaj la virino, ankoraŭ nun torturata en katenoj de la maljusteco, devas fine eliri sur la vojon de pli bona sorto, sur la batalvojon de la tuta subjuga homarparto por la feliĉa estonteco.

La ambaŭ n-oj de "Senn. Revuo" krias pri tio. Kaj ankoraŭ, krom la materialo presita, restis kuŝi ĉe ni kelka kvanto de manuskriptoj samesencaj, kiujn diverskaŭze ni ne povis uzi. Jen iu estas tro longa por amplekso de nia revuo, jen tiu havas tro lokan (etnografian) karakteron, ne sufiĉe kompreneblan internacie, jen tiu ĉi bezonas tro multajn korektojn. Tiu ĉi lasta ordinare ne estas absolute granda baro por ke la verko tamen estu akceptinda, ĉar korekti la gramatikajn kaj stilajn erarojn de nia laborista kunlaborantaro estas nepra devo de la Redakcio, — sed ofte estas necese almenaŭ prokrastigi tiajn skribaĵojn.

Alia malbonaĵo restis kuŝi sur nia konscienco. *Nur unu virino* sendis manuskriptojn al ni por la virina n-o de "Senn. Revuo". La tuta cetera aŭtor-maso, kiu skribis pri la virina problemo, estis la viroj. Ni do plene rajtas demandi: Ĉu la sorto de l' virinoj ne estas interesa al ili mem? Aŭ pli vere: ĉu ili ne kuraĝas liberiĝi el la edukita dum jarcentoj ĝenemo laŭte proklami sian virinan voĉon?

Pli kuraĝe, kamaradinoj!

Vi vane silentas!

Kaj se en tiu ĉi okazo vi nenion skribis pri la speciala virina temo, ni atendas de vi aliajn verkojn pri temoj laŭplaĉaj. Kaj estu certaj, ke la Redakcio kun aparta atentemo zorgos pri viaj skribaĵoj.

La Redakcio.



LA ALIAJ

LEON BERGIERS

I

Mizera perditaĵo de l' vivo, naskonta virino petis rifuĝon en hospitalo de l' centra urbo. Post teruraj doloroj, ŝi naskis filineton kaj mortis. La monaĥinoj konsentis gardi la infanon. Oni ŝin nomis: Anĝelo. La peniga akuŝo estis kripliginta la infanon. Ŝi estis lamonta.

Sen patrino! Sen prizorganto observanta eĉ plej malgravan movon. Sen ĝojo sen feliĉo! De tempo al alia, nigra monaĥino alproksimiĝas. Sen karesoj, sen ridetoj! Ĉio estis malhela ĉi tie. Kaj la voĉoj nur erstas strangaj flustradoj. Krio iafoje kontuŝas. Ploregoj sufokiĝas.

La *Aliaj* ekstere kantas kaj ridas. Tiuj bruoj ĉi tie aŭdataj, similas kruelajn mokojn kaj kelkfoje aĵo senfine milda kaj plenharmonia pasas sub la fenestroj. Estante pli aĝa, Anĝelo scius, ke tio estis muziko.

Viroj en nigraj vestaĵoj forportas ion per drapo nigra kovritan. Kaj tiuj kiuj eniras preskaŭ ne plu estas ĉi-mondaj.

Anĝelo kreskis en tiu medio. Ŝiaj unuaj jaroj ne konis tiujn promenojn en la publikaj ĝardenoj, apud la suno, la floroj kaj la birdoj. Nenia ludilo — por ŝin gajigi; nenia bildo por ŝin distri. Ŝia ĉambreto kalkŝmirita estis nuda nur, krucifikso ornamis la muron. Tiu krucifikso, emblemo de l' sufero, anstataŭis por ŝi patrinon. La infanaĝo akceptis tiun dion; la junaĝo forpuŝis ĝin. Krima dio, pro

kio ci kreis la Vivon, se ĉi lasta nur devas esti ploroj kaj rezignaciado? Pro kio ci ebligis tiun graveddiĝon? Kaj ĉu pro la malgranda Anĝelo estas nepre destinita viktimo?

Malnoblega veneno, ci permesis la malfeliĉon de milionoj da homoj. La scienco kaj la saĝo muldas la glavon, kiu renversos cin. Kaj la hodiaŭa junularo komencas la batalon, kiu detronigos cin. Ĉio konsiderata, Anĝelo estas bona profito por la establo. Al ĉiu el la riĉaj klientoj, kiuj venas por esti kuracataj, la monaĥinoj montris la kriplan infanon. Tio profunde kortuŝis tiujn sinjorinojn, do ili faris donacon.

— Vi aĉetu por ŝi kelkajn dolĉaĵojn.

Senutile ni diras, ke tiuj dolĉaĵoj neniam alvenis. Neniam ricevi amvorton! Ĉiam senti severan rigardon! La batoj, la insultoj estas pli preferindaj ol tiu rigoreco.

Baldaŭ la infano estis dekdujara. La monaĥinoj okupis Anĝelon je diversaj laboroj. Porti la manĝaĵojn al la malsanuloj. Elverŝi la malpurajn akvojn. Brosi la ĉambrojn ktp.

Maldikaj kruroj subtenis malfortan korpon, kovritan per nigra robo, multe tro granda. Enprofundiĝintaj okuloj, treege esprimoplenaj, kie oni legis strangan melankolion, brilis en tiu kadavreca vizaĝo. Kiam tiu knabino pasis, lamante kaj kvazaŭ hontante, kompato neesprimebla estiĝis en vi. Kelkfoje ŝi ridetis. Tiam ŝi rememorigis pri la bildo de la katafalkoj.

Je la sojlo de l' vivo, en tiu konfuzanta aĝo kiun ŝi trairis, kion ŝi pensis? Kion ŝi esperis? Ĉu la Vivo? Ĉu la Feliĉo? Ĉirkaŭ ŝi, la Morto agis; ŝi nur vidis suferantojn. Pro kio vivi kiam oni devas finiĝi sur tablo aŭ lito hospitala? Kiam estis neniu monaĥino en la ĉambroj, ŝi parolis al la malsanuloj. Ĉi tiuj plendis sin kaj ankaŭ ŝin. Iafoje ili donis al ŝi kelkajn bombonojn. Ĝene ŝi dankis.

Konversacioj inter malsanuloj kaj vizitantoj prenis iafoje ŝian atenton. Oni parolis pri fianĉoj, pri amo, pri edziĝoj, pri akuŝoj. Ĉio tio estis nur enigmoj por ŝi! Kaj foje ŝi vidis sangon. La bestoj estas instinktaj. Ŝi nenion komprenis. Sen patrino, sen fratinoj, sen amikinoj. Sola inter mortantoj! Ĉu ŝi scios tion kio estas viro pri kio ŝi aŭdis. La religio tenis ankoraŭ scion de l' viktimo. Dum tiuj ekscitegoj, ŝi genue ĵetis sin je la piedoj de l' Kristo en ŝia ĉambro. Ŝi ploris kaj poste preĝis.

Kaj nekomprenante, ŝi petegis:

— Dio mia, liberigu nin . . .

Dio ne liberigis ŝin. La fermento de l' Vivo agadis. Dio malantaŭeniĝis. La religio estas haltigilo por la infanaĝo, konsolo por la maljunaĝo; ĝi estas senpova kontraŭ la mistera viriĝeco kaj kontraŭ la viraĝo.

II

Sed ŝi devis labori. En tiu malbonodoranta atmosfero, la infano vivaĉas. Ŝi iras kaj reiras, trenante sian malfortan ostaron. Ŝia rigardo estas stranga, iafoje malbona. Malsanulo vokas ŝin, la alia ĝemas. Plendoj, preskaŭ stertoraj, leviĝas el ĉiuj kuŝejoj. La Morto flugetadas super la litoj. Ĝi observas Anĝelon.

Iafoje ŝi pasis tra la operacia ĉambro. Akra odoro surprizis ŝin. Sango makulis la aĵojn. En vazo ŝi duonvidis karnaĵojn: tio estis du mamoj, kiujn oni estis detranĉintaj de la lasta operaciitulino. Ĥirurgiaj instrumentoj kuŝas diversloke. Dum infana sonĝo, mi vidis senprecizajn klingojn strange brili. Tiuj iloj same impresas.

Iun tagon, alvenis juna virino, kiu devis esti operaciita je la ventro, dudekjara ŝi estis kaj ŝia beleco estus feliĉiginta pentriston. La doloro pli delikatigis ŝiajn trajtojn. Viro granda kaj forta estis ŝia amiko. Tre ofte, li venis ĉe ŝian liton kaj ambaŭ elverŝis larmojn. Vortoj ankaŭ estis interdiritaj. La fraŭlino aŭdis konversacion. Tiuj vortoj superis: amo, aborto, mizero, edziniĝo. Ŝi komprenis: ŝi estis dekkvarjara.

Tiun vesperon ŝi ne rigardis la krucifikson. Ŝi sin ĵetis sur sian litaĉon. Ŝiaj pugnoj fermiĝis. Ŝi mordis sian kapkusenon. Ŝia tuta korpo tremis. Varmaj larmoj sekvis.

La religio estis farinta novan viktimon. Anstataŭ starigi la fundamenton de amo universa kaj potenca, ĝi sekiĝas la animojn. La religio, patrino de la stultaj kutimoj ĉi mondon regantaj, permesas ke milionoj da infanoj eniĝas la vivon sen nenia Seksa kono. La multaj malnoblegaj dekliniĝoj estas kaŭzataj de la religio. Ĝi volas neebligi la sanan amon, aŭ pli ĝuste la laŭnaturan funkciadon de la seksaj organoj; ĝi kreas malsanecajn statojn. La gepatroj aŭ la parencoj kunkulpas. Ili kredas siajn infanojn ĉastaj kiam ĉi lastaj estas jam nur junaj malvirtuloj hipokritaj. La lernejo nenion diras al la infano pri ĝiaj organoj kaj la leĝo helpas la religion nepermesante al kuracistoj iujn peradojn. La junularo devas scii. La Scienco alportas al ĝi certajn rimedojn.

“Dio benas la vastajn familiojn“. Multaj kapitalistoj pagas ankaŭ monkompenson laŭ la naskoj. Eĉ la reĝoj faras tion. Ni, proletarioj, devas naski malmultajn infanojn, por ke ni povu konvene nutri ilin kaj por ke ili ne estu tiom mizeraj kiom ni. Ni akiru seksan edukadon kaj ni ne malebligu al iuj organoj niaj nefunkcii laŭnature. Reformoj estas necesaj. La serĉo pri la patreco devas esti lojale plenumita. Sed ĉefe ni dekretu la seksan edukadon devigan, por ke la morgaŭaj amantoj povu senriske interdoniĝi. Morgaŭo estus multe pli vivinda ol hodiaŭo. La prostitucio ne plu ekzistus. Kaj la virino estus liberigita kaj ne plu sub la arbitro de la religio, de la timo, aŭ de la viro kiel nuntempe.

Kion ni atendas por fariĝi sinceraj?

Anĝelo ploregis sur sia lito. Ŝi pensis pri la Aliaj. Ŝi arde deziras malprecizan ion. Dio mortis en ŝi. Nun la Vivo allogis ŝin. La malĝoja sonorilo anoncis meson. La kapo mallevita, la manoj kunmetitaj, monaĥinoj trairis la koridorojn. Ili iris aŭskulti tiun dion, kiu ne plu ekzistis por Anĝelo. Kaj ĉi lasta sin demandis, ĉu tiuj virinoj ankaŭ estas travivintaj tiujn situaciojn. Romano konstruiĝis en ŝia fantazio. La heroo estis junulo bela kaj forta, kiu iom similis tiun kiun ŝi estis vidinta apud la juna malsanulino. Ŝi revis pri mildaj karesoj, pri amemaj kisoj, pri konfuzantaj ĉirkaŭprenadoj, pri strangaj voluptoj kaj pri neesprimeblaj feliĉoj. Ŝi forgesis, ke ŝi estis malbela kaj kripla, ke ŝi estis enfermita por longa tempo. Ŝi poste sentis sin malboniĝi: ŝi malamis la monaĥinojn kaj ŝi estis preta por malbeni tiun, kiun oni diris senfine justa kaj bona, kaj kiu toleris tiajn maljustaĵojn! Ekstere rido eksplodis. Pro kio ekstere ridoj kaj ĉi tie nur ploroj? Ĉu la peza pordo de la hospitalo estus la limo inter la feliĉo kaj la malfeliĉo? Ŝi rekonsciiĝis kaj pensis pri la fantomoj. Pri sia patrino viktimo de la abomeninda reĝimo. Pri sia patro! Kaj ideosekvo venigis ŝin al konkludo; ke ŝia patro ne estis kulpa. Ŝi supozis alian kulpanton, grandan Kulpanton. Ŝi ne sciis, ke ĝi estis la socia ordo bazita sur la malnoblegaj religioj. Poste la ekstero refoje aŭdiĝis. Ŝi deziris ĝin. Kion ŝi farus ekstere? Vivi! Ŝi opiniis, ke la nigra mizero kiu atendis ŝin estus pli tolerebla ol la abomeninda kvieteco ĉi-tiea.

Kaj, iun vintran vesperon, dum la unua neĝo malĝoje falis, dekkvinjara fraŭlino eliris, nigre vestita. Ŝi forlasis sian tombejon. Ŝiaj delikataj membroj tremis, sed ŝia rigardo estis fajreca.

ABU LALA MAHARI

AV. ISAHAKJAN

DUA SURAH'O

*Tra la palmovicoj iris karavano, volviĝante bele laŭ serpenta ir',
Kaj leviĝis polvo, polva karavano, kiun majstre gvidis la venteta spir'.
— Iru karavano, marŝu senrevene, kien ja ďomaĝan lasis ni post ni?
Tiel alparolis mem al sia koro la poeto granda Abu Mahari'.
— Kion ni forlasis en la mond' meritan por reiri tien iam kun sopir'
Ĉu amikojn, fratojn, ĉu edzinon karan, gloron, familion, perlojn kun rebril'?
Ĉu patrujon lasis ni, komunon, homojn, leĝojn, jurojn, rajtojn, domojn de
justec'?
Marŝu do senhalte, nur malantaŭ restos trompo, hipokrito, ĉenoj de sklavec'!
Kio do cetere estas la virino? — ruza, trompa ino, sanga arane',
Kiu cin amante rabas ciajn poŝojn kaj perfide portas al pereo cin.
Estas pli fidinda trua ŝip' en maro, ol sinceraj ĵuroj falsaj de virin'.
Ja iblis' parolas mem per ŝia buŝo, ŝi — malica ino, ŝi — maskit-gehen'.
Ci pri stel' sopiras, pri lumbrila astro, pri anĝelflugila ĉasta konvalflor',
Por simile uzi al ulcero cia, — ora sonĝ' belega, kaŭze de l' dolor', —
Ci sopiras muĝon de torento gaja, kante cin leganta al la akvoŝpruc',
Ci sopiras verŝi larmojn a ĉielo, revis ci la roson de la malmortec',
— Sed al kor' soifa la virina amo salan akvon donas por turmenti cin;
Kaj pro ard', pasio ci deviĝas ĉiam leki la triumfan korpon de l' virin.
Ho, virina korpo, ci, pseŭdoserpento, ci, senĉerpa fonto de malbon' kaj krim',
Ci per karna ĝuo tuje malheligas la brilegan sunon de la homanim'.
Mi malamas amon; estas ĝi vundilo, maro forbruliga plena je pasi',
Ĝi, veneno dolĉa, kiun gustuminte homo iĝas sklavo aŭ despoto-fi!
Ja senkora estas amo, kiel morto, kaj de ĝi devenas ĉia malbonaĝ'
Ĝi — torento flua kiu en la mondo kolektadas daŭre ŝlimon da krimaj'.
Mi malamas inon, ŝiajn falsokisojn kaj karesojn pekajn, plenajn je venen';
Mi malamas ege ŝian marĉ-litaĉon, ŝian naskkapablon mi malamas jen,
Fian naskkapablon, kies produktaĉo en la mondo estas la mizera ar'
Da serpentoj, kiuj sin pikadas morde kaj profanas astrojn pro la pus-dezir'.
Ja kanajlo estas homo patriĝanta, kiu el feliĉa, bona malplenej'
Novan ulon kreas por la suferadoj, por gehen' de l' vivo, vivo-turmentej'.
"Mia patro kvankam kontraŭ mi pekiĝis, al neniu tamen faris pekon mi"[1])
Ĉi surtomban skribon havu mi post morto, se sub luno iam havos tombon mi.
Dum smeraldajn bordojn belajn de Heĝas' o plaŭde ĉirkaŭprenas ondoj de
la mar',
Mi ne plu revenos al virina korpo, mi ne plu sopiros pri l' virina ĉarm'.
Mi karesos krudajn karnojn en dezerto, la pikantajn dornojn kisos mi kun
flam'.
Kaj la kapon metos sur varmegajn rokojn, kaj ĉe l' rokaj brustoj ploros
mi en varm'...
Kaj kun muĝ' agrabla marŝis karavano, takte balancante laŭ serpenta ir'.
Sen malpac', trankvile marŝis ĝi antaŭen, al dezerto varma, ora malproksim';
Kvazaŭ ĝemploradis la kamelsoniloj, kvazaŭ sonlarmerojn verŝis ĝi laŭ stri'.
Kvazaŭ priploradis muĝe karavano, kion postrestigis Abu Mahari'.
Kaj la ĉarmaj flutoj de l' zefiroj dolĉaj kantis la ensorĉajn ŝargi' ojn kun tril';
Kantis pri amvundoj, pri angor' ĉagrena, pri subtila, sonĝe ĉarma eksopir'.
Kaj Abu Lalao meditadis peze kaj doloro lia sen komenc', sen fin',
Kiel ankaŭ vojo lia volviranta daŭris longe, morton ja ne havis ĝi.*

El armena lingvo trad. *G. Sevak.*

---

[1]) *Ĉi surskribon havas nun la tombo de la poeto.*

BIOLOGIA TRAGEDIO DE L' VIRINO[1])

PROF. *A. V. NEMILOV*

Malfacilaĵoj en la servo por la utilo de "genio de l' genro" estas distribuitaj inter viroj kaj virinoj plejgrade neegalpeze. Biologia tragedio de l' viro estas eta, kompare kun tiu biologia tragedio, kiu estas endotita en la fiziologian bazon de virina organismo. Kompreni vivon de virino kaj ŝian animon estas eble nur atentante la nomitan biologian bazon. Ĉiuj malkompreniĝoj, disiroj kaj dramoj, kiuj ĉiutage aperas inter viroj kaj virinoj, donante neelĉerpeblan materialon por artistoj, beletristik- kaj dram-verkistoj, dependas ne sole de sociaj kaŭzoj, sed ili havas kiel sian prakaŭzon ankaŭ tion, ke la viro tuta, ĝis la mem eble albumenaj molekuloj de ĉeloj, estas biologie alia ol la virino, kaj ke ilia biologia sorto ekde momento de la seksa diferenciĝo ĉe embrio disvolviĝas laŭ tute diversaj vojoj.

En la pasinta tempo estis eluzitaj ne malmultaj vortoj, koleremo kaj inko por pruvi egalecon aŭ neegalecon inter virino kaj viro. Nuntempe jam ne multaj estas adeptoj, konvinkitaj ke socia rajtaro de l' virino devas esti limigata, kompare kun tiu de la vir-duono de l' homaro. La malnova proverbo: "kokino — ne birdo, virino — ne homo" jam malaperas el parollingvo kaj iom-post-iom estas forgesata. La ideo pri la seksa egaleco ĉiam pli kaj pli penetras la konscion de popolamaso. Sed se estas eble kaj necese energie pledi seksegalecon (socian), oni ne devas opinii, ke ĉi-principo, suflorata eĉ de la plej primitiva sento de justeco, povas esti facile efektivigita en la vivo reala. Nenie en la mondo estas tiel same multo farita en la sfero de seksegaliĝo, kiel en USSR, kaj nenie estas pli progresiva leĝdonado pri la virina demando, kiel en Sovetlando. Tamen por neniu estas sekreto, ke efektiva situacio de l' virino tre malmulte ŝanĝiĝis post la Oktobra revolucio.

Kaj tio dependas ne nur de tio, ke ni vivas ankoraŭ en la transira al socialismo-epoko, sed ankaŭ de tio, ke efektigo de revoluciaj elementoj en tiu ĉi sfero kunpuŝiĝas kun tre grava cirkonstanco, nome kun la *biologia neegaleco* inter la seksoj, kun malsama biologia ŝarĝo. La biologia neegaleco inter la seksoj estas eĉ pli profunda kaj serioza, ol tio ŝajnas al homo, nescianta natursciencon. La biologian neegalecon ni ne rajtas kompreni tiel, ke unu aŭ la alia sekso estas pli alta aŭ malalta. La viro kaj virino estas absolute *egalvaloraj* kaj la seksmaturiĝo enkaŝas egalajn eblecojn por la disvol-

---

[1]) Eltiraĵo el la libro: Prof. *A. V. Nemilov*. Biologia tragedio de l' virino. Skizo de fiziologio de l' virina organismo. Leningrad, 1925.

viĝo. Sed poste aperas malsameco kaj neegaleco en situacio. La korpo de l' viro kaj virino vivas sub tute diversaj impresoj: la virorganismo en fina stato tute ĝis la plej subtilaj histaj elementoj kaj eble eĉ ĝis albumenaj molekuloj estas tute alia, ol tiu de l' virino.

Dank' al la ekskluzivaj eltrovoj de Ŝtejnaĥ, Atias, Zaradovski k. a. oni sukcesis eksperimente pruvi, ke la korpoj de ambaŭ seksoj estas *ekvipotencialaj,* sed malsame kapablaj realigi kaŝitajn en la organismo eblecojn.

La tragedieco de l' virina sorto estas nome en tio, ke ĉe la plena ekvipotencialo de l' organismo, ĉe la sama diferenco de aliaj vivaj estaĵoj, dependanta de la eksterordinara alteco kaj unuflanka direkto en la evolua disvolviĝo de l' homo, ĉe tute samaj postuloj kaj celado, kaŭzitaj de la altdisvolvita nervsistemo kaj komplikaj "endokrin"-aj organoj, la virino neegale estas ŝarĝita kompare kun la viro per biologiaj devoj.

Tiuj nemultaj ĝojoj, kun kiuj estas ligita la servo de l' virino al la "genio de l' genro", tute ne kvitiĝas kun tiuj suferoj kaj malfeliĉoj, de kiuj estas plena la vivo de ĉiu, eĉ de la plej sana virino. Ŝia tuta vivo ekde naskiĝo ĝis tombo estas plena de disharmoniiĝoj, inter kiuj estas eble nur ekvilibriĝi, sed venki kiujn ni ne povas, ĉar la homo forestas ekster la sekso.

La vivo de l' virino en pli granda grado, ol tiu de la viro, estas ligita kun sorto de tiuj seksaj ĉeloj, kiujn ŝi naskas. La naturo ne postulas de la viro zorgon pri plua sorto de liaj "gametoj" (seksaj ĉeloj), post kiam ili penetris en virinan organismon, kaj ilia sorto ne tuŝas la staton de lia korpo. Moralo kaj postuloj de la ŝtato ktp. povas certe ordoni al li seriozan rilaton al ĉiu seksa kuniĝo, rezultanta seninterrompan vicon de pluaj fenomenoj en la vivo sur la tero. Sed tio estas io duagrada, biologie ne deviga por li.

La vivo de l' virino dividiĝas je la periodoj, el kiuj ĉiu surmetas klaran sigelon sur ĉiujn fibrojn de ŝia korpo kaj animo.

La *unua periodo* komenciĝas de apartiĝo de gametoj kaj finiĝas tiumomente, kiam okazas unua ov-ellaso, t. e. eliro de gameto el organismo.

La *dua periodo* enhavas la vivon de l' virino ekde la unua ovellaso ĝis unua seksa kuniĝo, kiam ŝian korpon invadas la viraj gametoj.

La *tria periodo* — ofte plej longedaŭra, sed ĉiam plej aktiva en la deviga servo al la "genio de l'genro" — daŭras ekde unua seksa kuniĝo ĝis finiĝo de l' ovellaso (klimakterio).

La *kvara periodo* fine daŭras ekde momento de klimakterio ĝis la morto.

En la unua periodo fluas tuta vico da subtilaj ŝanĝoj en la korpo, kiuj preparas kaj difinas estontan sorton de l' individuo. Sed ĉi-procedoj ne estas tiaj, ke oni povu paroli pri biologia tragedio dum tiu ĉi aĝo. Ĉi-tempe la ambaŭ seksoj estas biologie egalecaj, kaj la vivo de l' knabino same estas harmonia, same plena de ĝojo de la estado, kiel tiu de la knabo.

La unua ovellaso estas jam granda okazintaĵo en la vivo de l'virino, ĉar tio montras la finon de l' feliĉa infaneco. Ekde tiu ĉi momento komenciĝas por la juna virino la dua periodo de l' vivo, dum kiu ŝi kompare kun siaj samaĝuloj entrafas la malplej bonajn kondiĉojn por disvolviĝo de sia individueco, ĉar en ŝia korpo komencas periode funkcii tre gravaj procedoj, potence ĉirkaŭprenantaj ĉiujn flankojn de ŝia ekzistado, bremsantaj la norman disvolviĝon de ŝia mensa laborkapablo.

Kune kun la veno de l' seksmaturiĝo komenciĝas samtempe ankaŭ tiu "erotikiĝo" de la nervsistemo, tiu ekscitiĝo de l' seksa centro, kiuj enkondukas en la vivon de l' junulo novajn sentojn, dezirojn, ĝuojn kaj suferojn. Ni ne povas nei, ke erotikiĝo de l' cerbo en la certaj linioj aldonas al la tuta organismo la konatan sanan vivigan "tonus"-on kaj parte ekscitas emocian flankon de l' homa organismo. Sed en ĉi-rilato oni povas rimarki diferencon inter la viro kaj virino. En la procedo de seksa vivo por la viro estas dotita aktiveco, per la virino-pasiva rolo. La seksa sento ĉe la viro akrigas lian aktivecon, entreprenemon, energion, kreemon, plenigas lian animon per kuraĝaj ĝis aroganteco revoj kaj planoj, kaj en certaj limoj ĝi akcelas disfloriĝon kaj formiĝon de lia personeco. Ĉe la virino la erotikiĝo de l' cerbo plialtigas nur ŝian pasivecon. Ŝia animo pleniĝas ne per soifo de ago kaj batalo, sed per dolĉaj revadoj kaj plenumeblaj esperoj kaj per celado sin oferi. La viron do la seksa sento aktivigas, la virinon ĝi subpremas, kaj ŝia aktiveco esprimiĝas ofte nur en koketeco.

Turmentiĝo de akuŝo apartenas al unu el la plej akutaj suferegoj kaj estas tute neevitebla kaj forigebla, ĉar ĝi estas nepro de l' virina naturo. Ĉiu virino, lasinta embriiĝon, per tio oferas sin al teruraj fizikaj ekskuoj, kiuj venas post naŭ monatoj laŭ la potenco de l' biologia leĝo.

Ĉiuj akuŝoj portas en si krom tio la konatan danĝeron: ebleco de mortiga sangofluo, vundiĝo de l' naskvojo, malrapide resaniĝanta kaj facile infektebla. Ĉiu akuŝo surmetas signon sur la korpon kaj animon de l' virino: ŝi kvazaŭ sin konsumas por la infanoj kaj en la servo al interesoj de l' genro perdas sin mem, sian "mion".

Nenion similan travivas la viro, kaj en nenio, eble, la neegaleco inter la seksoj kaj la biologia tragedio esprimiĝas tiel klare, kiel en la kruela neceso pagi per suferoj por tiuj maldaŭraj minutoj, kiujn ĝuas la virino en la seksaj amĉirkaŭprenoj.

Ju pli multe la virino akuŝas, des pli multe ŝin ĉirkaŭkreskas kondiĉrefleksoj, ŝi pli kaj pli ligas sin al la ĉirkaŭanta vivo kaj deiras de la ekvipotenciala al ŝi viro, kiu tiutempe, ellaboras por si diversajn refleksojn, riĉigantajn lian vivon. Ne scianta aŭ ne sufiĉe konscianta tion la viro ĉesas kompreni la virinon, kaj ili ambaŭ komencas paroli, tiel dirate, en malsamaj lingvoj.

Tio, kio estis priskribita, ripetiĝas ne unu-, sed multfoje kaj ŝanĝas la tutan organismon de l' virino. Estante ligita kun la sorto de siaj gametoj, la virino dum la tuta seksa agado, estas alkatenita al ili, kiel punlaborulo al sia puŝĉaro, kaj ĉe ĉiu provo foriri de ili kaj ekvivi kiel la viro, ŝi pli kaj pli arde sentas sian "biologian sklavecon".

Tio finiĝas nur tiam, kiam venas la kvara periodo de ŝia vivo, sed ŝi nun surpaŝas la plej teruran tragedion — la morton.

Fiziologio de l' virino, atingita klimakterian aĝon, pasas sub la signo de l'minuso. Ĉiuj procedoj, funkciantaj en ŝia korpo, iras inercie, kvazaŭ nevole. La luksa templo de l' virina korpo aliformiĝas en forĵetitan konstruaĵon, kiu senĉese ruiniĝas kaj ĉirkaŭkreskas per musko kaj herbo.

La klimakteria periodo estas epoko de mortiĝo ne nur de l' korpo, sed ankaŭ de tio, kion oni nomas "animo". La flugiloj estas rompitaj kaj kune kun la seksaj ĉeloj senrevene malaperas ankaŭ tiu "tonuso de l' vivo", sen kiu estas malfacile komenci novan vivon.

Sed se la virino ne povas iam ajn liberiĝi de tiuj bremsiloj, kiuj estas enmetitaj profunde en ŝian naturon, tio ne signifas, ke tiu ĉi biologia tragedio ne povas esti plimalgrandigita.

Ni devas senĉese iri pluen kaj serĉi tiajn novajn formojn de l' vivo, kiuj povus dolĉigi la "tragedion de l' sekso".

Unue necesas ĉion diritan scii por ke oni lernu kompreni la virinon kaj estu al ŝi justa. La viro, konanta la biologion de la virino, ne estas ĉagrenata, koleriĝanta aŭ mokanta ŝiajn subitajn humorŝanĝojn, senkaŭzajn koleriĝojn kaj agojn sed male li ĉiel helpas ŝin.

La naskoj devas esti laŭeble per helpo de scienco reguligataj. La sciencon necesas direkti al serĉado de diversaj vojoj por almenaŭ plimalgrandigi la biologian tragediecon de l' virina vivo.

Esperantigis *Nikolao Ŝevĉugov*.

NOVAJ VOJOJ EN JUĜADO DE SEKSOJ

GERTRUD RÄUBER

Pri malmultaj demandoj oni parolas kaj skribas tiom da sensencaĵoj kiel pri la kompara seksa psikologio. La libera ĝusta opinio ankaŭ de multaj scienculoj estas malklarigita per antaŭjuĝoj tradiciaj, kies deveno estas en la tempo de la senlimigata estreco de la viro. Kiel forte eĉ en esploroj medicinaj-psikologaj la deziro estas patro de la penso kaj detruas ĉian objektivecon, pruvis tre bone la historio de la cerbanatomio. Oni trovis ĉiam denove pruvita — ankaŭ en plej kontraŭdirantaj eltrovoj — la opinion jam elpensitan pri la virina malplivaloro.

Novaj ofte tre revoluciaj vidpunktoj kaj pensoj pri la psikologio de viro kaj virino troviĝas en la verko de la esplorgeedzoj D-ro Mathilde kaj D-ro Mathias Vaerting. La verko en tri libroj kun la titolo komuna: Nova kreado de la psikologio de viro kaj virino (germane: Neubegründung der Psychologie von Mann und Weib, Karlsruhe i. B., libroeldonejo Braun) incitas, ke oni ricevu kun granda singardo la juĝojn de scienculoj kaj laikoj pri viraj kaj virinaj ecoj. La du libroj, kiujn la geedzoj Vaerting aperigis ĝis nun, prezentas al leganto multajn novajn vere surprizantajn ekkonojn kaj incitojn.

La unua libro kun la subtitolo: La virina karaktero en la virŝtato kaj la vira karaktero en la virinŝtato (germane: Die weibliche Eigenart im Männerstaat und die männliche Eigenart im Frauenstaat, 1921) donas rerigardon historian de jarmiloj kaj montras kun riĉa historia kaj etnologia fontmaterialo, ke ĉia superregado de unu sekso (de la viro, kiel estas ankoraŭ hodiaŭ kaj de la vivino, kiel estis ekz. en Egipto antaŭ jarmiloj) tute delokigas la fizionomion kaj la psikon de la seksoj tiamaniere, ke oni ne plu povas ekkoni la diferencojn naturajn kaj la multajn aliajn breditajn. Kvalitoj de karaktero, moralaj normoj, laboroj kaj valorigoj — eĉ korpaj formoj —, kiujn ĝis nun oni rigardis kiel vivajn tipojn, estas en virinaj ŝtatoj efektive virinaj tipoj; kontraŭe tiaj al kiuj ĉe ni la nomo "virinaj tipoj" estas donata, en ŝtatoj kun virina regado aperas kiel viraj tipoj. Do, ĉi-tio estas la konsekvenco de regado kaj de subjugado. Mi volas doni unu ekzemplon, ke la diferencigo de la seksoj estas la rezultato de potenco. La papiruso, konata sub la nomo: Londona manuskripto, montras klare, ke en antikva Egipto la virino estis la parto varbanta en la amo. La viro devis ĵuri fidon kaj obeemon al la virino, ŝi sola decidis pri ŝia posedo, la viro devis doni la dotaĵon, kaj la virino, laŭ du kontraktoj de edzeco de la antaŭgreka periodo de Egipto, povis disiĝi de la viro.

.En la periodo de egalrajteco, kiu laŭ opinio de Vaerting ĉiam estas inter du periodoj malproksimaj de regado de viro kaj de virino, la seksa diferencigo estas limigata je necesa minimumo, ĉar tiam la diferencigo laŭ principo de regado ne estas efika.

Nun, post periodo de virregado ni estas en la komenco de tia periodo de egalrajteco, do kun la potenco de la vira sekso ankaŭ la artefarita seksa diferencigo estos forigata. Kontraŭe, la naturaj ecoj de ambaŭ specoj plene krekos. Kiuj estos ĉi-tiuj ecoj, oni ne povos ekscii ankaŭ helpe de ĉiuj psikologaj kaj biologaj esploroj, ĉar komparo de seksoj sur egala fundamento hodiaŭ estas neebla por ni, estantaj ankoraŭ malproksimaj de la potencekvilibro. Sed la postuloj de Vaerting, kiuj estas tiel malfaciligataj per la batalo de la virŝtato kontraŭ la historiaj postsignoj de la virina regado kaj de la en ĉi-tiu tempo ekzistinta korpa kaj intelekta strukturo de la seksoj, tamen kun granda certeco pruvas, ke la konsento de la seksecoj devas esti sufiĉe forta. Sur la fundamento de iliaj esplorrezultoj Vaerting esperas, ke la egalrajteco fermos la fendon, kiun unuseksa regado formas, kaj sur kiu intelekta kaj seksa harmonio nur en la plej malofaj okazoj ebliĝas. Tiam korpo kaj animo en seksa pureco povas troviĝi je plej alta feliĉo.

La dua libro: Vereco kaj eraro en la seksa psikologio (germane: Wahrheit und Irrtum in der Geschlechterpsychologie, 1923) precipe donas psikologajn informojn. La aŭtoroj montras kun amaso de pruvmaterialo, ke la psikologio estas falsigita per la superregado de unu sekso. Oni batalas en la kampo de la kompara psikologio kontraŭ la hipotezo pri la simileco de la du homaj specoj helpe de la seksaj diferencoj, per kiuj oni volas montri la superregadon de la regantoj kaj la malfortecon de la subjugitoj. Ekzemplo montru, kiel forte la scienculoj penadis provi ĉi-tiun ĉiutagan opinion: Al intelektekzameno en Berlin knaboj kun geometria instruo de trijaroj estis komparitaj kun knabinoj, kiuj ĝis nun ne konis instruon matematikan kaj kiuj krome estis unu jaron pli junaj ol la knaboj. Tiamaniere oni ektrovis pli grandan kapablecon de la knaboj en geometria pensado. Kaj ĉi-tiu simplanima maniero ektrovi diferencojn de sekso ne estas kritikita per aliaj scienculoj.

Plue, en la hodiaŭa psikologio eĉ de honeste serĉantaj esplorantoj ne estas observata, ke en la dusekseco ĉiu homo montras neŭtralan seksan flankon al la propra, kaj seksan ekscitigeblan flankon al la alia sekso. Se la esplorrezultoj estos denove ekzamenataj kun konsidero de seksa influo inter diversseksaj personoj, estos ŝanceligata en la fundamentoj sciencaj la doktrino de la pli granda virina senteco kaj de la pli granda vira intelekto.

La tria falsiganta faktoro estas la malsama eduko de la seksoj. Per longjaraj ekzercoj, komencantaj depost la unua vivtago ankoraŭ hodiaŭ, la bredo artefarita — simpatia al la sekso reganta — estas ŝanĝita en la fiksajn formojn de kutimo. En la hodiaŭaj psikologaj

esploroj pri seksdiferencoj ĉi-tiuj edukinfluoj estas malĝuste konataj aŭ nekonsiderataj kaj per tio la rezulto estas senvalora.

La eduko estas diferencigata en la kerno per tio, ke edukantoj kaj edukantinoj estas tute malkonforme disdonataj je ambaŭ seksoj kaj ke tial la seksinfluo estas multe pli granda en la eduko de la knabinoj ol en la eduko de la knaboj. Laŭ aliaj esploroj la geedzoj Vaerting reprezentas la opinion, ke instruo kaj eduko florigas la vivon plejmulte, se ili estos aranĝitaj laŭ la du seksoj.

La tria libro ne ankoraŭ aperis. Ĝi devas pritrakti la efektive kaj ne nur ŝajne naturajn seksdiferencojn, kiel ili jam nun estas koneblaj.

La aŭtoroj konfesas, ke estas unua provo por ŝanceli malnovajn — suferojn naskigantajn — teoriojn. Certe la historiaj kaj psikologaj fontfundamentoj devos ankoraŭ esti ekzamenataj ekzakte kaj estos necese plue esplori en la montrita linio, por uzi la materialon de la faktoj pri nova juĝado de la ecoj de karaktero kaj de la laboroj de viro kaj virino. Ĉiuokaze la verko estas admono, ke oni ne alprenu sen kritiko juĝojn pri la virina naturo — ke ili estu kiel eble malnovaj kaj subtenitaj per honorindaj tradicioj — sed ke oni ekzamenu ilin kritike por pli bona komprenemo de viro kaj virino. Precipe ĉi-tiuj devas legi la librojn, kiuj ne rigardas la "seksbatalon" kiel necesaĵon en la naturo.

PATRINO

A. BEZIMENSKI

Ekzistas bonaj, karaj patrinetoj . . .
Dum niajn tagojn ni bruligas en batal',
Subite en memor', plenplena je trumpetoj,
Aperas ili kiel varma lum-detal'.

Kaj tiam ne patrinon de senkulotuloj
Vi rememoras — mem irintan kun pafil',
Sed tiun, kiu timas pli, ol centon da mondbruloj,
Ke ne eltrinkis lakton
La malobeema fil' . . .

Patrino —
Ŝi ne fariĝas trankvila,
Ĉu vi mamsuĉas, ĉu jam barbulo.
Ĉiam teruro pri sorto de l' filo
Tremas en ŝiaj okuloj.

Patrino —
Ŝi estas konstante malĝoja
Kaj ĉiam sopiras.
Ŝi ne komprenas, ke estas sun-vojoj,
Kiujn aparte vi iras.

☼

Mi rememoras, ke mi dum knabaĝo
Multe ĉagrenis al la patrinet',
Kiam kun frat' mi pafadis kuraĝe
Per sagoj al reĝo-portret'.
Kaj rememoras mi, kiel deklaris
Mi malsatadon por unu nur hor'.
(Tiel unue do strikon mi faris
Pro cigaredoj prenitaj for).

Mi pliaĝiĝis, sed ŝi bedaŭregis:
— La knab' super libro sen dormo
[normal' . . .
Sed trankviliĝis ŝi, ĉar ja mi legis
Libron tre sobran:
"La Kapital'"

☼

Ho, panjo, panjo! Kie do kompreso via?!
Min resobrigu de la sobra libr'!
Ja min envolvis pro linio ĉiu,
Pro ĉiu vorto pli ebria vibr'.

Kaj jen mi nun de l' tagoj bridon prenas,
De l' tagoj bridon, kiuj trenis nin.
Potencon super ter' mi ĝojas kaj mi venas
Kontraŭ malnova mond' — kaj kontraŭ
[vi, patrin'.

Sed de post tiam . . . ho, doloras
[ŝultroj, brusto!
Mi, knab' iama kun printempa vigla
[flam',
Kaj junebria simple, home, bone, juste,
Pro la severa libro resobriĝis jam.

Kaj jen mi scias vidi ĉion, kiel decas,
Penetri tra tavol' per la okula bor'
Kaj antaŭvidi en fabriko estontecon,
Kaj vidi sangon en sonoro, nigra or' . . .

Kaj scias mi: ne sola ja mi penas,
Fabrikaj brakoj jen al suno tiras sin.
Potencon super ter' mi scias kaj mi venas
Kontraŭ malnova mond' — kaj kontraŭ
[vi, patrin'.

☼

Kaj jen antaŭnelonge
Al la gepatra angulo
Mi venis el nova hejmo komuna.
Per bonaj maljunaj okuloj
Min renkontis paceta laguno.
Samaj estas ĉi-tie la temoj senŝanĝe . . .
— La pan' plikariĝis, fadenoj, brasiko . . .
Nur iufoje la patro dum la tagmanĝo
Parolas pri la alta politiko;
Sed la patrino denove: lakt', margarino . .
Nur iel pase alparolas ŝi min:
— Ĉu scias vi, filo? Mi estas bolŝe-
[vikino,
Sed neniam mi estos . . . komunistin'!
Aŭ jen ŝi ĝojas espere subite,
En angulo ie ŝi sidas
Super mia vestaĵo ŝirita
Kaj insidas:
— Pri kapitalo vi legis — ne gajnis,
Kaj certe ne gajnos vi ĝin.
Sed vojon ne solan ja havas vi, ŝajne?
En la partio ne restu sen ĵin' . . .
Venu al ni vi, kara knabo.
Sep jarojn plej bonajn forperdis vi.
Loĝu kun ni — fabrikos vi sapon . . .
Ĵetu bileton de la parti'!

☼

Kaj foje, per helpo de l' frato,
Estis ŝtelita mia bilet',
Kaj ŝi ekfloris, kiel skarlato,
Ĝin kaŝinte en angulet'.
Sed mi la karan maljunan kapon
Premis al mia brusto kun fort':
— Panjo! Diru, ĉu aŭdas vi frapojn?
Kio estas tie en kor'?
Mi rigardis post ŝi karese.
Nu, kion ekvidus blindeta ŝi?
Kredeble, ŝi traktos min freneza,
Ebria pri si . . .

☼

Ne komprenos ŝi, la patrineto,
Makuleta en nia labor': · –
Portas mi la partian bileton
Ne en poŝ', sed en kor'.
El la rusa trad. N. V. Nekrasov.

KIUN EL ILI?

Z. LIBIN

Vintra nokto. La pala vidvino ekdormis super la laboro, tirante la kudrilon. Jen ŝi eksaltetis, elfrapis la okulojn kaj reekprenis tiri la kudrilon. Ŝi ne povas: la fingroj ne malrigidiĝas. La kapo malleviĝas, la koro forsvenas de malforteco. Ŝi ne povas. Ŝi ellasas la kudrilon de l' mano.

Sur liteto, apud la tablo, dormas ŝiaj infanoj: tri palaj, malfortaj infanoj de mortinta cigaredfaristo kuŝas, dronante en ĉifonoj, nestiĝinte unu al la alia. Elmontriĝas nur tri palaj vizaĝetoj, kiuj ŝajnas esti pli kiel mortintaj ol vivantaj animetoj.



K. KOLWITZ — SUFERO

La patrino forlasis la laboron. Ŝi enrigardas en la fornon, kaj kiam ŝi ekvidas, ke la fajro estas estingiĝinta, ŝi ĝemetas peze, aliras al la liteto kaj kovras pli bone siajn infanojn.

Estas jam malfrue nokte, sed ŝi ne kuŝiĝas, per malfeliĉa, patrindolora rigardo al siaj infanoj ŝi ekhaltas meditante.

Ekstere estas venteme. La vento disverŝiĝas per spasma plorado. Ŝajnas, ke mil diabloj kaj spiritoj funebradas iun mortinton, pluvo frapas al la fenestroj kaj super la tegmentaĵo. La tuta domaĉo tremas, kaj ŝajnas, ke jen preskaŭ ĝi enfalas enterigante sub si ĉiujn ĉi malriĉulojn, kiuj sin turmentas inter ĝiaj malhelaj, malpuraj muroj.

Kion pensas la vidvino? Per siaj gajnaĵoj ŝi siajn infanojn ne povas nutri; la malsat-morto tiriĝas al ŝi ĉe la pordo. Ŝi per sia malforta povo ne povas ĝin forpeli. Du infanojn ŝi devos fordoni al orfejo, unu restos ĉe ŝi. Kun unu infano ŝi eble povos travivi per siaj malsufiĉaj gajnaĵoj . . . ŝi devas tion fari kaj des pli rapide . . . se ŝi ne subfalos de laco. Ŝi laboras super siaj povoj . . . ŝi tion ne elportos . . . kaj la patrino staras kaj pensas, kiun el la tri ŝi restigu ĉe si kaj kiujn fordonu . . .

Ŝi rigardas siajn infanojn. Ŝia koro disŝiriĝas je profunda, profunda doloro kaj ŝi ne povas decidi . . .

Ŝiaj rigardoj flugas de unu infano al alia; ŝi ilin egale amas, kaj ne scias, kiun ŝi de si fortiru. Ŝi rigardas la dormantajn infanojn kaj ŝiaj brogaj patrinaj larmoj ekfalas malrapide sur iliajn palajn vizaĝojn.

La infanoj jam scias, ke du el ili oni disigos de la patrino: ili subaŭdis, kio okazis inter la patrino kaj ŝiaj parencoj. Kaj la infanoj petegas ŝin, ke ŝi ilin ne fordonu. Ili rigardas ŝin per timigitaj okuletoj, kisas ŝin, ĉirkaŭpremas ŝin kaj ĉiu infano petas pro si.

— Panjo, min ci ne fordonu.

— Panjo, mi restos ĉe ci.

— Panjo, mi . . .

— Panjo, mi . . .

Ronjo promesas, ke ŝi ne petas manĝi, Banĉjo estos bonulo kaj neniam malbonfaros, nur la patrino lin ne fordonu al orfejo. Kaj Samĉjo ploras kaj ĉirkaŭkaptas la kolon de l' patrino.

Kiun translasi?

Ŝi pensadas kaj la koro formortas de doloro.

"Panjo!" — ekdiris infano je dormo, ĉe la patrino ektiris koron kaj ŝi ekploris . . . kaj la vento ploradas kaj ploradas kaj la pluvo batadas al la vitraĵoj.

El juda lingvo trad. *Trinaŭkvinok.*

NOKTE

Estis dum malvarma vespero, preskaŭ noktmeze. La urbo estis kovrita per netravidebla vualo de pluvo kaj nebulo. Li estis irinta ĉi tien, por doni al kelkaj el la mizeruloj la kuprajn monerojn, kiuj estas bezonataj por pasigi la nokton en la rifuĝejo, anstataŭ pasigi ĝin en la malvarmega nokto. Kiam li estis malsuprenirinta la ŝtuparon — la tunelo estis plenigita per homoj, kiuj, tolerinte ĉiujn stadiojn de la mizero, nun atingis la lastan. Li vidis antaŭ si vizaĝon de virino, kies trajtoj per lepro kaj sangaj ulceroj estis terurege detruitaj. Je la brusto ŝi havis suĉinfanon, je la mano ŝi kondukis eble 14-jaran knabinon, dum 3-jara knabo alkroĉis sin je la robo.

— 2 ŝilingojn nur, sinjoro . . .

— 2 ŝilingojn nur, sinjoro . . .

— Li restis staranta, por demandi ŝin.

kion vi volas . . .

— 2 ŝilingojn nur — ŝi estas ankoraŭ tiel juna, sed ŝi faros ĉion, surstrate, nur 2 ŝilingojn . . . Nur vidu kiel belega ŝi estas . . .

Kaj ŝi tiris la knabinon pli proksimen, kiu tremante kaj plorante deturniĝis.

Terura tremo superŝutis lin. Sed la peteganta kaj ĝemanta voĉo de la ino denove komencis:

— Bonvole, do kunprenu ŝin. Se vi ne konsentas, ni devas dormi surstrate, nur *2* ŝilingojn . . . Nur vidu kiel belega ŝi estas . . .

Kaj denove ŝi altiris la knabinon . . .

Li sentis, kiel naŭzego atakis lin, senkonscie kaj ne kapablante paroli eĉ nur unu parolon, li turniĝis por foriri.

Sed li ankoraŭ ne estis irinta paŝon, kiam la virino ĵetis sin antaŭ liaj piedoj kaj alkroĉis sin.

— Ne foriru! Ne foriru! — ŝi vokis en terura malespero. Se vi ne kunprenos ŝin, ni devas mortmalsati, ĉi tien neniu plu venos, kaj iri al la bordo ne estas permesite al ni. Kunprenu ŝin, do kunprenu.

Sed kiam li sen intenco ĉirkaŭrigardis, eksaltante ŝi timege vokis:

— Ne voku policiston, ne, ne, ne voku policiston!

Pro ŝia ekstaro li retrovis sian trankvilon. Senparole li enpoŝigis la manon kaj donis al ŝi, kiom li povis kapti.

La ino furioze ĝojkriis. Denove ŝi ŝovis la knabinon al li.

— Ŝi kuniros, sinjoro, ŝi faros ĉion, kion vi volas, — ŝi flustre aldonis.

Li deturnis sin kaj iris kiel eble plej rapide tra la vicojn de la mizeruloj kaj ebriuloj. Neniu estis observinta la scenon.

Kiam li estis je la bordo, li sentis kiel rapide batis lia koro kaj tremis la manoj.

Kiu estas pli kompatema, la patrino aŭ la infanoj? Kiel terura devas esti la mizero? kiel granda la malesperego, kiel freneza la malsato de ambaŭ?

Sed kun abomeno la virinoj de la burĝoj parolas pri la "abomenaĵo de patrino". Kvankam ĉi tiuj virinoj, suferante la saman mizeron, irus la saman vojon.

El germana lingvo tradukis *W. Kampfrad.*

PRI PATRINTAGO

PAUL NEUGEBAUER

Jam de kelkaj jaroj en multaj urboj de Germanio estas aranĝataj "Patrintagoj", t. e. festotagoj je honoro de l' patrino. Ĉiu donacu florojn aŭ ion alian al sia patrino. Ĉe tablo la patrino okupu la honorlokon, ktp. Al la mortinta patrino oni metu florojn sur la tombon.

Jen kelkaj pensoj pri tiu tago.

Kio estas, aŭ pli bone, kion signifas patrintago? En tiu tago ni ĉiuj memoru pri niaj patrinoj. Je tio tute ne estas necese montri ian ajn eksteran signon kiel floron aŭ ian alian donacaĵon. En nia

koro loĝu la amo por niaj patrinoj kaj en tiu tago ni promesu ĉiam ami kaj honori ilin. Precipe ni, proletoj, havas multajn kaŭzojn por esti dankemaj al niaj patrinoj, ĉar ni ja nun spertas je la propra korpo, kion faris niaj patrinoj por ni. Ĝuste la proletedzinoj pleje sentas la malfacilan situacion, en kiu troviĝas la proletaro. Iliaj koroj ĉiam estas premataj de zorgoj kaj ĉagreno. De kie preni la monon bezonatan por nutraĵoj, loĝejo, vestaĵoj kaj aliaj vivbezonaĵoj? Ofte ŝi malsatas por ke la familianoj ne ion malhavu; ĉar la salajro, perlaborita de edzoj, tute ne sufiĉas por la vivsubtenado. Kie kaj kiam ili nur povas, ili helpas al la edzoj per hejmlaboro aŭ io alia, zorgante dumtage por la familio, kaj laborante ofte dum la duona nokto. Kaj jen, la kapitalista sociordo eĉ ne permesas al proletoj, ke ili povu rekompenci la amon de siaj patrinoj dum ilia maljuneco. Ni tute ne estas kapablaj rekompenci la amon, per kiu ni estas edukitaj. Do la amo al niaj patrinoj devas esti instigilo al batalo por la socialismo. Batalante por ĝi, ni pleje povas ilin honori, ĉar en socialista ŝtato, aŭ pli bone, en socialista sociordo ne povas esti ebla, ke niaj patrinoj dum maljuneco malsatu. Do, gekamaradoj, ni batalu por la socialismo, tio pli multe, ol floroj kaj aliaj aĵoj, montros, ke ni amas niajn patrinojn.

Estu permesate al mi diri kelkajn vortojn pri burĝeco kaj patrintago. Ankaŭ en tio montriĝas la mensogemo kaj hipokriteco de la burĝa ideologio. Per kia reklamo ili anoncas ĉi-tiun festotagon de l'patrino! Kiajn sentimentalajn artikolojn ili publikigas en gazetoj ktp. Kaj samtempe ili kondamnas, malestimas kaj malestimigas patrinon, kiu naskis needzecan infanon!

Tiu hipokriteco ne havas lokon en la socialista sociordo, ĉar al ĝi devas esti sankta la patrineco, ĉu edzeca aŭ ne. Do, gekamaradoj, ankaŭ ĉi-tiu konkludo devas instigi nin al batalo por pli bona sociaranĝo.


Gekamaradoj, antaŭe mi diris, ke la patrineco estu al ni sankta. Ĉu politikisto, naciisto, scienculo aŭ iaj aliaj uloj povus aserti, ke ekzistas ia diferenco inter la patrineco de germanaj, francaj, italaj aŭ aliaj virinoj? Ne, trifoje ne, neniu kapablos tion aserti. Ĉu nature sentantaj virinoj, tute egale al kia ajn nacio ili apartenas, povas konsenti, ke la objekto de ilia patrineco kaj amo estu mortigata de aliaj homoj? Ne, ne, ne. Ĉiuj virinoj de l' tero devas unuiĝi en la ekkrio:

— Ni ne volas lasi mortigi tiujn, kiujn ni portis sub niaj koroj. Ni ne volas suferi la doloron, perdi niajn karulojn. Ni eduku la niajn tiel, ke ili abomenu suferigi patrinojn de aliaj popoloj. Pro tio, virinoj tutmondaj, envicigu vin en la grandan armeon, batalantan por la paco inter ĉiuj popoloj. Milito kontraŭ milito, batalu por la socialismo, por la mondpaco! Jen kion signifas la patrintago por la proletaro.

LA BONŜANCAJ INFANOJ DE DERBYSHIRE

Jen priskribo de ideala lernejo, kiu aperis en la Labour Woman (Laborista Virino), la oficiala organo de la Virinfako de la Laborista Partio Brita en dec. 1925. Derbyshire estas distrikto (*county* t. e. graflando) en mezo de Anglio, kie estas progresema Edukad-Komitato. Nuntempe la registaro tie ĉi komencis limigi tiajn komitatojn.

La observema okulo de s-ino Anderson, nia organizistino en la nord-okcidento rimarkis bildon de la ĉe Findern lernejo, kaj ni tuj sciis, ke jen estis la lernejo pri kiu ni sonĝis. La Derbyshire'a County




Vido (s.-orienta) de ludkampo

Edukada Komitato havas bonegan arkitekturiston s-ro G. H. Widdows, kiu sendis al ni la fotografaĵojn kaj planojn de la lernejo kiun li, depost nelonge, konstruis kaj donis al ni multe da utilaj informoj pri ĝi. Ni petas ĉiujn virinajn komitatojn, ne nur studi ilin mem, sed sendi ekzemplerojn al ĉiuj membroj de ilia Edukada Komitato. Se ili jam havas ion pli bonan por iliaj infanoj, petu ilin sendi la planojn kaj fotografaĵojn kaj ni povas enpresi ilin ankaŭ. Ne estas utile diri, ke ĉi-tiu estas tro ideala lernejo por urba distrikto. Estas vere, ke ĝi havas grandajn kampojn sed eĉ sen tiuj, la lernejo estas admirinda kaj ĉiu vilaĝo devas havi la eblon por imiti ĝin.

Kial ni estas tiom entuziasmaj pri ĝi? Unue, ĝi donas al la infanoj tiel plej proksime kiel eble la subĉielan kaj ekstermovan vivon. Ambaŭflanke la klasĉambroj povas esti tute malfermataj, sed dum ventega vetero ili povas esti fermataj je la venta flanko. Due, la varmiĝo

fariĝas per varmegaj tuboj sub la betonaj ebenblokoj de la planko. Ĉi-tiuj blokoj estas varmaj kaj higienaj. Dum la piedoj de la infanoj estas varmaj la sango cirkuladas bone, kaj ili ne sentos la malvarmon de la subĉiela aero, eĉ en la plej vintra tempo. La lumado estas el la nordo, kaj la klasĉambroj, kiel oni povas vidi en la bildo, ricevas regulan radiadon tra la vitro de la tegmento. Tiu ĉi lumado estas tre ŝatata de artistoj, ĉar ili scias la gravecon de regula, klara kaj difuzita lumo. La meblaro de la lernejo estas la plej bona; ne ekzistas la kunpremigaj "benkoj" (skribtabloj) sed komfortaj seĝoj kaj tabloj por ke infanoj je diversaj grandoj povu facile enlokiĝi. La ĉambroj estas plenaj da sunlumo, ĉar, kvankam la ĉefa lumado estas tra la tegmenta



Interna vido de klasĉambro de la sudo, montras la metodon de lumigado

fenestro, la verandoj ambaŭflanke kaj la vitraj pordoj enirigas multe da sunbrilo, eĉ se la vetero estas tiel malbona, ke ili ne povas esti malfermataj. Ili povas esti parte malfermitaj kaj estas konstruitaj ankaŭ por funkcii kiel ventumilo dum la plej malbona vetero.

La lernejo ankaŭ havas bonajn lavlokojn, kvankam la latrinoj estas ekster la ĉefa konstruaĵo laŭ la reguloj de la Board of Education. (Edukada Komitato). Estas tia bona spacaranĝo por la instruistoj kia por la infanoj, kaj la vestĉambroj estas speciale bone aranĝitaj. Varma akvo trapasas la stangojn sur kiuj pendas la vestoj por ke, dum la infanoj estas en la lernejo la malsekaj surtutoj sekiĝu kaj varmiĝu komforte pretaj por la hejmirado.

La ludejoj kaj ludkampoj rekomendas sin mem. Je unu flanko de la lernejo estas floroj kaj kreskaĵoj kaj antaŭ ili troviĝas bone plantita kaj boneformita herbejo.

Kompreneble, ĉi tiu lernejo estas malgranda. Ĝi estas konstruita nur por naŭdek infanoj, kaj nuntempe havas kvindekdu sur la nomarlisto. Ĝi kostas proporcie pli multe ol lernejo por pli da infanoj, sed la komitato, konstruinte ĝin, intencas konstrui ĉiujn niajn lernejojn laŭ la sama plano. Konstruotaj nun estas la sekvantaj: Dronfield, por 300 infanoj; Staveley, por 680 infanoj; Shuttlewood, por 340 infanoj; Killamarsh, por 480 infanoj; kaj tri aliaj por nombroj similaj.

La spaco po ĉiu infano kalkulas je dekdu kvadrataj futoj por la pli maljunaj, kaj dek kv. futojn por la pli junaj. La kosto po infano estas proksimume £ 40, sed tiu sumo enhavas la koston por la plantado de la grandaj kampoj, ktp. Kalkulante je pli justa mezuro



Interno de klasĉambro rigardante suden

la konstruada kosto estas proksimume 1 ŝ. 9½ d. po kuba futo. Tamen, en la pli grandaj lernejoj la kosto estas proksimume 1 ŝ. 2 d. po kuba futo. Ĉe Staveley la kosto po infano estas proksimume £ 38. Ĉe Dronfield, la konstruaĵo enhavas Fakon por kuracista ekzameno, kaj la nova lernejo kvankam konstruita nur por infanoj, enhavas ĉambregon kion la infanoj de la malnova lernejo povas uzi. Eĉ tiam la kosto estas 1 ŝ. 9½ po kuba futo kaj £ 43 po infano (300 infanoj).

Por tiaj lernejoj patrinoj devus labori. Tiuj lernejoj faras grandan utilon por infana sano. Se la infanoj estus sanaj kaj feliĉaj en la lernejo, iliaj mensoj kreskus pli rapide kaj en pli bona maniero. Oni povas vidi kiel liberaj kaj bone okupitaj estas la infanoj en tiaj lernejoj. Ideale estas havi lernejon en ĝardeno, kaj jen oni alproksimiĝas je tiu idealo. Ni ja dubas, ke en brita klimato, ni povus esti pli proksime. Infanaj subĉielaj lernejoj, estu nia celo. (Trad. el angla lingvo.)

PRESEJO:
UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT
LEIPZIG (GERMANIO)